

## Konkurso

### por elekto de invitantoj de konferencoj de ILEI en la jaroj 2017 kaj 2018

**La Konferenca Regularo** de ILEI ([ilei.info/dok/regularo\\_konferencoj.rtf?lingvo=eo](http://ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf?lingvo=eo)), punkto 3, preskribas:

*Ĝenerale la Konferencon invitas ILEI-Sekcio aŭ loka Esperanto-organizo kaze de ne ekzisto de Sekcio. La inviton akompanu utilaj informoj pri la Konferencaj ejoj, loĝlokoj, kostoj kaj subvencioj. Al la oficiala invito estu aldonita ekzemplero de ĉi tiu Regularo, subskribita de la invitanta instanco, por atesti, ke ĝi respektos ĝiajn regulojn, se la invito estos akceptita.*

(Fino de la citaĵo)

#### **Alvoko**

Surbaze de tio, la Estraro de ILEI invitas sekciojn de ILEI, aŭ aliajn Esperanto-organizojn kunlabore kun la ILEI-sekcio, aŭ memstare se en la lando ne ekzistas sekcio de ILEI, kandidatiĝi por

- invitanto de la jubilea 50-a Konferenco de ILEI planata por la jaro 2017, aŭ/kaj
- invitanto de la 51-a Konferenco de ILEI planata por la jaro 2018.

Konsiderante, ke la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2017 okazos en Seulo, Korea Respubliko, kaj ILEI emas konferenci en la semajno ĵus antaŭ, aŭ la semajno tuj post UK, relativan avantaĝon havos kandidataj konferenclokoj kun laŭeble mallonga kaj malmultekosta vojaĝo inter la okazejoj de la Konferenco kaj de UK. Tamen povas kandidatiĝi ankaŭ organizoj kiuj ne plenumas tiun kondiĉon, sed kun atento, ke la Konferenco ne koliziu nek konkurencu kun UK aŭ alia grava internacia E-evento.

Ĉar la loko kaj lando de la 103-a UK ankoraŭ ne estas konataj, invitanto de la 51-a konferenco en 2018 devos esti preta por laŭbezona adapto de la konferencaj datoj al la datoj de UK.

**Kriterioj** por elekto de konferenca invitanto estas:

- Organizaj fortoj kaj spertoj de la kandidato,
- Taŭgeco kaj kostoj de proponata konferencloko kun teknikaĵoj,
- Loĝkostoj kaj komforto,
- Veturebloj kaj veturkostoj por alveno kaj foriro de konferencanoj,
- Proponata enhavo kaj orientigaj kostoj de turisma kaj kultura programo,
- Pruveble atendebla subteno de lokaj aŭtoritatoj kaj amaskomunikiloj,
- Ŝancoj por gajni subvencion,
- Atendeblaj efikoj al la lokaj E-movado kaj ekstermovada medio,
- Kiom longe ILEI ne konferencis en la kandidata lando,
- Facileco kaj kosto de veturo inter la Konferenco kaj UK se la Konferenco okazos ĵus antaŭ aŭ tuj post UK.

**Organizaj postuloj:**

- + La konferenco devas esti sendependa E-evento sen konkurenco de aliaj samtempaj kaj samlokaj eventoj.
- + Financa mastrumado de la konferenco apartenas al ILEI; ĉiuj konferencaj enpagoj kaj elpagoj principe iras tra ILEI. La Loka Konferencorganiza Komitato (LKK) devas havi konferencan kasiston kiu kunlaboros kun la kasisto de ILEI. LKK dezirinde disponu enlandan bankkonton por faciligo de enlandaj pagoj.
- + La Konferenca Regularo de ILEI estas deviga por ILEI kaj por la konferenca invitanto.
- + LKK laboras sub gvido de la estrarano pri konferencoj de ILEI kaj kune kun li/ŝi respondecas pri la konferencorganiza laboro al la Estraro de ILEI.
- + Por la 50-a Konferenco en la jaro 2017, ĉio devas esti preta por anonci la Konferencon kaj startigi la aliĝadon plej laste dum la 101-a UK en Nitra, 2016, kaj la 49-a Konferenco en Nyíregyháza, 30 julio - 6 aŭgusto 2016.
- + Por la 51-a Konferenco en la jaro 2018, ĉio devas esti preta por anonci ĝin dum la 101-a UK en Nitra, 2016, kaj la 49-a Konferenco en Nyíregyháza, 30 julio - 6 aŭgusto 2016, reklami ĝin kaj varbi subvenciojn dum la posta jaro, kaj startigi la aliĝadon plej laste dum la 102-a UK en Seulo kaj la 50-a Konferenco de ILEI en la jaro 2017.

#### **Kiel konkursi ?**

Kandidatiĝan leteron, kun esprimita kaj motivita intenco inviti la konferencon, precizigante por kiu konferenco vi kandidatiĝas, ĉu en la jaro 2017 aŭ 2018, bonvolu sendi retpoŝte al la estrarano pri konferencoj:

Radojica Petrović <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>

plej laste ĝis: 31 jano 2016.

Bonvolu aldoni al la letero:

- Deklaron, ke vi akceptas la Konferenca Regularo de ILEI (Aldonaĵo 2 ĉi-sube), kaj subskribitan ekzempleron de la regulato kiel ateston, ke vi respektos ĝin se via invito estos akceptita;
  - Bazajn informoj laŭ la jena demandaro:
1. Prezento de la organizaĵo/ILEI-sekcio kiu kandidatiĝas por inviti la konferencon, ĝiaj organiza strukturo, adres- kaj kontakt-informoj, agadplanoj, agadrezultoj kaj motivoj por inviti la konferencon?
  2. Prezento de ebla LKK: prezidanto, kasisto kaj aliaj taskplenumontoj?
  3. Kion vi proponas por la konferencejo? Kiomkoste (proksimume) kaj kun kiaj kondiĉoj kaj teknikaĵoj?
  4. Kiujn datojn vi proponas por la konferenco kaj kiel ĝi rilatus al aliaj E-eventoj atendeblaj en tempa aŭ geografia proksimeco de la konferenco?
  5. Kian kaj kiomkoston (proksimume) loĝadon vi povos proponi al konferencanoj?
  6. Kiaj estas veturebloj kaj veturkostoj por alveno kaj foriro de konferencanoj?
  7. Kian subtenon de la loka/landa E-movado kaj ne-movadaj institucioj vi povas certigi por la konferenco? Per kio vi pruvas tion (ekz. subskribita subtendeclaro de koncerna institucio, formala interkonsento k.c.)?
  8. Kion, orientige, vi proponas por la turisma kaj kultura programo de la Konferenco konforme al la konferenca programskemo (Aldonaĵo 1 ĉi-sube)?
  9. Ĉu eblas peti subvencion por la konferenco aŭ iu ĝia programero (simpozio, lingva festivalo k.c.)?
  10. Kiaj, kiutempaj, kiom longaj kaj kiom kostaj (proksimume) estas vojaĝebloj inter la proponata konferencurbo kaj okazejo de UK se la Konferenco okazos ĵus antaŭ aŭ tuj post UK?
  11. Ĉu vi kapablas mem krei aŭ solvi kreadon kaj vivtenadon de konferenca retpaĝaro?
  12. Ĉu vi kapablas mem krei aŭ solvi kreadon de la konferenca simbolo (emblemo)?
  13. Ĉu vi havas proponon aŭ preferon por la konferenca temo? Bonvolu klarigi motivojn de via propono aŭ prefero?
  14. Kiu(j)n universitato(j)n aŭ/kaj altlernejo(j)n vi povas engaĝi por la dutaga dumkonferenca simpozio pri la konferenca temo? Bonvolu precizigi tipon de la engaĝo: kunorganizi/subteni/aŭspicii/gastigi. Kia temo precipe interesus ilin por la simpozia traktado?
  15. Ĉu vi havas specifajn fakajn temojn kaj bezonojn gravajn por ILEI-agado en via lando, via mondoparto kaj ĝenerale, kiujn vi ŝatus proponi por la konferenca programo konekse kun aŭ sendepende de la konferenca ĉeftemo, enkadre de aŭ aldone al la proponita programskemo (Aldonaĵo 1)?
  16. Ĉu vi povas proponi programerojn kaj aktivaĵojn okaze de la Konferenco malfermajn al ekstera publiko por plia videbligo de Esperanto kaj levo de prestiĝo de esperantistoj en la loka medio, kaj por plifortigo de kunlaboro kun ekstermovadaj fakuloj kaj institucioj?
  17. Ĉu vi povas proponi antaŭkonferencan aŭ postkonferencan turisman kaj/aŭ fakan programon por konferencanoj kiuj dezirus resti pli longe en via lando aŭ najbare?

La Estraro de ILEI pristudos ricevitaĵajn kandidatiĝojn kaj komunikos la rezulton al ĉiuj kandidatoj plej laste ĝis: 20 feb 2016.

Se estos selektitaj pli ol unu kandidatoj por plutraktado, ili ricevos pli detalan demandaron, kiun necesos respondi ĝis 31 mar 2016 por definitiva decido pri elekto de invitanto de la konferenco. Tiukaze la Estraro komunikos la definitivan elekton ĝis 30 apr 2016.

Ĉaĉak, 2015-12-10

Por la Estraro de ILEI

Radojica Petrović  
Estrarano pri konferencoj

Aldonaĵoj:

1. Ĝenerala kaj adaptebla programskemo de la Konferenco de ILEI
2. Konferenca Regularo de ILEI

## Ĝenerala kaj adaptebla programskemo de la Konferenco de ILEI

### Ĝenerala ĉiutaga temposkemo (povas esti modifita laŭ kutimoj de konferencando)

07h30–09h00	Matenmanĝo
08h00–18h00	Turisma programo (ne nepre ĉiutage)
09h00–10h30	Labora kaj kleriga programo
11h00–12h30	Labora kaj kleriga programo
12h30–14h00	Tagmanĝo kaj siesto
14h00–16h00	Labora kaj kleriga programo
16h00–16h30	Kafpaŭzo
16h30–18h00	Labora kaj kleriga programo
18h00–20h00	Vespermanĝo, libera tempo
20h00–22h00	Vespera kultura kaj distra programo
22h00–...	Nokta programo: Gufujo, junulara programo, ...

### Programfadenoj

#### O Organiza programo

- O1 Konferencaj plenkunsidoj (en kiuj partoprenas ĉiuj konferencanoj), ekzemple: solena malfermo, ĝenerala debato, konkluda plenkunsido, ceteraj plenkunsidoj
- O2 Komitatkunsidoj, Estrarkunsidoj, LKK-kunsidoj
- O3 Laborgrupoj, diskutrondoj, interkonsiliĝoj, kolokvoj, forumoj k.s. pri temoj el la vivo de ILEI

#### F Faka kaj kleriga programo, ekzemple:

- F1 Seminario: Instruista trejnado
- F2 E-kurso por komencantoj
- F3 Paroliga E-kurso por progresantoj
- F4 E-gramatika kurso por perfektigantoj
- F5 Seminario: E-kulturo kaj interkulturo
- F6 ILEI-gimnazio
- F7 Diskutrondo: E-instruistaj spertoj
- F8 Prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj
- F9 Simpozio pri la konferenca temo
- F10 Ekspresa kurso de loka lingvo
- F11 Fakaj laborgrupoj, diskutrondoj, interkonsiliĝoj, kolokvoj, forumoj k.s. pri temoj el la sfero de interlingvistiko kaj E-pedagogio

#### K Kultura, distra kaj turisma programo

##### K1 Vespera programo

- K1.1 Interkona frandvespero
- K1.2 Nacia vespero
- K1.3 Internacia vespero
- K1.4 Konferenca bankedo
- K1.5 Konferenca balo
- K1.6 Adiaŭa vespero
- K1.7 Aliaj vesperaj programeroj

##### K2 Nokta programo

- K2.1 Babilejo (maldormejo, "gufujo", amikejo)
- K2.2 Muzikdanca programo, junulara programo

##### K3 Turisma programo

- K3.1 Transporto inter UK kaj la konferencujo se la Konferenco kaj UK okazas unu tuj post la alia
- K3.2 Duontagaj (DT) ekskursoj
- K3.2 Tuttagaj (TT) ekskursoj
- K3.3 Promenekskursoj tra la konferencurbo

##### K4 Lingva festivalo

##### K5 Sporta programo, ekzemple:

- K5.1 Piedpilka matĉo de teamoj de konferencanoj kaj lokanoj
- K5.2 Revuo de etnotradiciaj sportoj
- K5.3 Sportaj posttagmezoj

## KONFERENCA REGULARO DE ILEI

### Principoj

1. Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI-Konferenco) estas internacia manifestacio de la instruistaro de Esperanto. Ĝi celas fortigi iliajn ligojn, evoluigi la instruadon de Esperanto kaj studi ties problemojn. La oficiala lingvo de ILEI-Konferenco estas Esperanto kaj dum ĝi estas pritraktataj temoj ligitaj al la teorio kaj praktiko de la instruado de Esperanto.
2. La Komitato de ILEI starigas la Konferencan Regularon, kiu servas kiel kontrakto aŭ estas la bazo kaj konsista parto de eventuala aparta subskribita kontrakto inter ILEI kaj la invitanta instanco en la konferenca lando.
3. Ĝenerale la Konferencon invitas ILEI-Sekcio aŭ loka Esperanto-organizo kaze de ne ekzisto de Sekcio. La inviton akompanu utilaj informoj pri la Konferencaj ejoj, loĝlokoj, kostoj kaj subvencioj. Al la oficiala invito estu aldonita ekzemplero de ĉi tiu Regularo, subskribita de la invitanta instanco, por atesti, ke ĝi respektos ĝiajn regulojn, se la invito estos akceptita.
4. La Estraro de ILEI informas la Komitaton pri la planoj por estontaj Konferencoj kaj konsultas ĝin pri la movad-politika dezirindeco okazigi ILEI-Konferencon en difinita mondoparto aŭ lando.
  - a. Surbaze de invito, kiel priskribite en la art. 3, interkonsente kun la Estraro de ILEI kaj kun la koncerna Sekcio aŭ loka Esperanto-organizo, la Estrarano pri Konferencoj esploras surloke en la invitanta lando la proponitajn kondiĉojn kaj raportas al la Estraro, kiu decidas pri la loko, tempo kaj temo de la ILEI-Konferenco kaj difinas la bazajn trajtojn de la Konferenca programo.
  - b. La Estraro decidas principe minimume du jarojn antaŭe pri la okazigo de ILEI-Konferenco en difinita lando.
  - c. La Estraro aktive sekvas la preparlaborojn de ILEI-Konferencoj.
5. En kazo de invito laŭ art. 3, ILEI kaj la invitanta instanco subskribas apartan kontrakton kun la konsidero de la lokaj cirkonstancoj pri la organizado de la ILEI-Konferenco. Per aparta kontrakto inter ILEI kaj lokaj instancoj oni reguligas ankaŭ diversajn aliajn aspektojn de la konferenca organizado plenumotajn de aparta Konferenca Estraro el minimume tri personoj elektota en la unua kunsido: konferencejo, loĝado, ekskursoj, ktp. Tiujn kontraktojn ellaboras kaj nome de ILEI subskribas la Kasisto.
6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. La Estraro de ILEI havas la rajton rifuzi la aliĝon de persono, pri kiu ekzistas motivita suspekto, ke tiu malutilas al la reputacio de la ILEI-Konferenco aŭ post interkonsiliĝo kun la lokaj organizantoj, ĉesigi la partoprenon de Konferencano, kiu ne obeas ĉi tiun preskribon.
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.
8. La Estrarano pri Konferencoj rajtas haltigi ĉiun agadon koncerne ILEI-Konferencon, kiu ne konformas al ĉi tiu Regularo. En kazo de malkonsento, la koncerna instanco/persono rajtas apelacii al la Estraro, kiu havas la finan vorton.

### Administrado

9. Principe la ĉefa administrado kaj librotenado de ILEI-Konferenco estas prizorgata de la Kasisto de ILEI. Al tiu oni sendas la aliĝojn kaj mendilojn kaj principe ankaŭ ĉiujn pagojn.
10. La lokaj organizantoj havas la taskon regule informi la Estraranon pri Konferencoj pri siaj laboroj kaj decidoj.

11. En la oficiala organo de ILEI, Internacia Pedagogia Revuo (IPR), aperas aliĝilo en la numero aperanta fine de la antaŭkonferenca jaro kaj diversaj informoj pri la Konferenco.
12. Neniu rajtas je senpaga aliĝo al ILEI-Konferenco. La estraro rajtas aprobi rabaton en la kotizo por tiuj, kiuj laboras en la organizo kaj kontribuas al la programo de la konferenco, depende de la efektiva laboro dum ĝi.
13. Kalkulo de kotizoj laŭ kategorioj kaj periodoj:
  - a. La kotizo estas fiksita en eŭroj.
  - b. La bazan konferencan kotizon fiksas la Estraro de ILEI laŭ A kaj B-kategorioj laŭ UEA.
  - c. Rabaton je 20% ricevas la instruistoj de la Gimnazio, ĉiu junulo malpli ol 30 jara kaj handikapuloj.
  - ĉ. Aliĝinto, kiu ne estas membro de ILEI por la koncerna jaro devas krompagi 25% de la baza kotizo, escepte de tiuj, kiuj estas inkluzivitaj en kategorio 13c.
  - d. ILEI-Estraranoj rajtas aliĝi kun rabato je 25% de la baza kotizo.
  - e. La aliĝperiodoj estas: la unua ĝis la 31-a de marto, la dua ĝis la 30-a de junio kaj la 3-a ekde la 1-a de julio de la konferenca jaro.
  - f. En ĉiu nova aliĝperiodo al ĉiu kotizo aldoniĝas 20% de la samkategoria kotizo en la unua periodo.
  - g. 50% de la kotizo estas repagotaj se aliĝinto malanoncas sin pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio de la konferenca jaro.
14. Por faciligi la partoprenon de homoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj la Estraro decidas pri subteno al Konferenca Kaso, kiun administras la Kasisto de ILEI.
15. En okazo de profito rezulte de ILEI-Konferenco la invitanta instanco ricevas 10%.
16. En kazo de malprofito okaze de ILEI-Konferenco, ILEI plene respondecas pri la likvido de ĉiuj ŝuldoj.
17. Ĉiuj dokumentoj rilataj al la ILEI-Konferenco estas proprajo de ILEI kaj devas esti senditaj al la adreso de la Sekretario de ILEI antaŭ la 1-a de februaro de la post-konferenca jaro.
18. Por ĉiuj demandoj ne traktitaj en ĉi tiu Regularo validas la Statuto kaj Interna Regularo de ILEI. En kazo de dubo aŭ malkonsento aŭ de eksterordinaraj cirkonstancoj ne antaŭviditaj en ĉi tiu Regularo decidas la Estraro de ILEI.

Teksto aprobita dum la ILEI-Konferenco en Bratislava (aŭgusto 2004).